

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj, rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

2017-09-05 Putin proponas Blukaskulojn – intencas akiri Donbas.

Tiel kritikis Marieluise Beck (federacia parlamentano de la germana Verda Partio), spertulino pri orienta Europo, la proponon de la rusa prezidento V.Putin:

meti blukaskulojn laulonge de la linio inter Ukrainio kaj la separatisma Donbas-regiono.

Komento AVE/mw: necesus internacia kontrolo de la limo (post la SU-disintegriĝo) inter Ukrainio kaj Rusio.

2017-09-04 **EP subtenas „fajfistojn“ (angle: whistleblower)**

Ekonomia komitato (ECON) de la Europa Parlamento grandskale akceptis la Raporton de la jura komitato (JURI) por protekti fajfistojn, kaj postulas chi-rilatan leĝon.

Molly Scott Cato (Verduloj) estis la respondeculino por tiu raporto. Krome ECON kreis fonduson por finance subteni fajfistojn se tiuj spertas malagrablajhojn (ekz-e estas maldungataj).

Sven Giebold komentas, ke tiu leĝo necesas, ĉar sen kuraghaj homoj kiuj donas informojn pri skandalaj financaj kaj impostaj agadoj, ne eblas malkashi.

Bedaurinde la Kristan-demokratoj sin-detenis – kial ?

Chu ili kredas ke ja ekzistas Dio kiu persekutas la fiulojn ?

Ne, ili postulis, ke subtena fonduso ne necesas, kaj antaŭ „fajfi“ oni unue devus informi la chefon (chu ili kredas ke chiuj chefoj estas chiam honestaj) ?

(laŭ www.sven-giebold.de, MEP Verduloj/Regionalistoj : <http://bit.ly/2gyIsJR>)

Komento de AVE/mw: En Rumanio la civitanoj protestas kontraŭ korupcio – de la moshtuloj.

Ekzistas indico pri (sentata) korupcio: eo.wikipedia.org/wiki/Indico_de_perceptata_korupto

Detaloj trovighas en ali-lingvaj wikipedioj.

2017-09-24 Elekto de la germana federacia parlamento

La Verda Partio ricevis 8,9% de la voĉoj.

Ili estas en pluraj registaroj de la federaciaj landoj; kune kun diversaj partioj.

2017-06-16/18 Germana Verda Partio komencis la baloto-kampanjon

okaze de tiu partia kongreso parolis tutmonde elstaraj homoj: www.gruene.de

- Elizabeth May, Verda Partio de Kanado, kiu forte kritikis CETA, la diskutata merkato-interkonsento inter Kanado kaj EU: ne necesas, kaj minacus la demokration. Krome ŝi rakontis, ke en la kanada provinco Brita Kolumbio la Verduloj ricevis 8,2 % je la elektoj, averaghe en Kanado 3,4 %. Pro la ne-demokratia baloto-sistemo ili ricevis tamen nur 1 seĝon por ŝi en la parlamento.

- Nadia Murad, (speciala ambasadoro de UN pri homvendado) por la jezida etno kaj religio en Sirio kaj Irako.

La t.n. „Islama Shtato“ celis estingi tiun etnon. Virinoj estis perfortitaj, viroj mortigitaj. Baden-Virtembergo donis azilon kaj invitis kelkajn mil da jezidinoj, ke ili restu en sekureco, ghis la islamista milito finighus.

Legu pri ŝi kaj tiu temo en: en.wikipedia.org , pri homvendado ekzistas pagho en Esperanto.

2017-06-04 Nova respondeculo por kontakto inter AVE kaj la Verdaj Partioj

Okaze de nia malgranda AVE-kunsido en Friburgo/Brisgovio George Sossois (Belgio), [george.sossois \(che\)](mailto:george.sossois@hotmail.fr)

[hotmail.fr](mailto:george.sossois@hotmail.fr) , pretis transpreni la taskon teni la kontakton kun la Verdaj Partioj kaj kun la kontinentaj federacioj kaj kun Tutmondaj Verduloj. Koran dankon al George.

2017-05-05 Bone vivi – programo de la francaj Verduloj, EELV

Jen la aktuala programo de EELV, kiu entenas alineon pri lingva politiko kiu respektas la regionajn kaj minoritatajn lingvojn; kaj krome la alineon „ni subtenas neutralan internacian lingvon kiel Esperanto“

Nous soutiendrons une langue neutre internationale telle que l'espéranto.

<http://aveclecologie.fr/bien-vivre/>

2017-04-13 Gratulon - Bonaj sukcesoj por Verduloj je komunumaj elektoj en Finnlando
Vihreät – De Gröna ricevis tutlande 12,8%, kun pli alta nombro en la grandaj urboj.
Fakte por ricevi fidon tutlande, necesas bona laboro surloke.

2017-04-14 EU Civitana Iniciativo kontraŭ glifosat – bonvolu subskribi
Maria HEUBUCH, MEP Verduloj & Regionalistoj, petas ne forgesi la subskribon.
Shi kritikis ke eĉ la EU-parlamentanoj ne rajtas vidi la dokumentojn surbaze de tiuj ECHA (EU agentejo por kemiaĵoj) deklaris Glifosaton (Glyphosat) sendanĝera. Sed ili esploris nur la puran kemiaĵon, sed ne la uzatan miksaĵon. Krom tio la UN-speciala raportistino Hilal Elver kritikis, ke oni ne diskutis la detruigan efikon de pesticidoj sur la naturmedio (ekzemple la nombro da insektoj reduktighis draste), kaj ke ili ofte kausas san-problemojn ankaŭ che homoj.
<https://www.maria-heubuch.eu/home/singleview/news/uno-warnt-vor-katastrophen-folgen-von-pestiziden/>
Antaŭ monato mi informis pri la lanĉo de tiu ECI. Kiu ja bezonas 1 miliono da subskriboj por esti valida.
Bonvolu subskribi, kaj eble plivastigi la alvokon:
Jen la ligilo – bonvolu unue elekti vian lingvon (tie en la linio aŭ sur la paĝaro tute supre):
<https://sign.stopglyphosate.org/?lang=de>

2017-04-06 AVE partoprenis sukcesplene che la Tutmondaj Verdaj Partioj - surprizoj
AVE partoprenis la komunan kongreson de la Tutmondaj kaj de la kontinentaj federacioj de Verdaj Partioj, kiu okazis 2017-03-29/04-02 en Liverpool.
Dejhoris 3 AVE-anoj (Manfred, Marteno, Ronaldo) kun forta subteno de 2 lokaj samideanoj Peeter kaj ankaŭ Brendan el Liverpool. En la program-broŝuro trovighas konciza teksto pri Esperanto & Verduloj.
Ni renkontis 3 plurajn samideanojn kiuj aktivis en sialanda Verda Partio (Sally, Diana kaj Stephanie); krome plurajn kiuj iam eklernis Esperanton, inter ili Reinhard Bütikofer, MEP.
Do, entute pli ol 10 samideanoj partoprenis kongreson de ĉirkaŭ 1000 personoj.
Kaj kompreneble ni havis la eblecon informi multajn pri la avantaĝoj de Esperanto servi kiel justa lingvo-ponto. Malmultaj diris ke ili tute perdis la esperon ke Esperanto iam povus servi ĝenerale kiel lingvo-ponto.

Ni informis pri Esperanto pere de inform-tablo kaj -panelo. Sur la panelo:
– informshildo nia emblemo kaj „Asocio de Verduloj Esperantistaj“ & „Assn. Esperanto Greens“
- la bela afiŝo en pli ol 100 lingvoj „PACO estas ...“ - tre tauga por koncize montri kaj voĉlegi,
- afiŝo de la germana partio „Die Grünen“ (Verduloj) el 1984 kiu montras ĉielarkon kaj „Atomenergie – Nein Danke!“ en 40 lingvoj, inter ili Esperanton,
- afiŝo pri 100-jariĝo de Esperanto kun la foto de L.L.Zamenhof.
Ni montris verdpartiajn dokumentojn en Esperanto, krome literaturon kiel Monato, Esperanto (de UEA), lernolibron de Stano Marcek, romanon de Heinrich Böll, broŝuroj pri budhismo, de TEVA, ktp.

Du apartaj surprizoj okazis:

1. Dum kunsido de la Tutmonda Verda Junularo, kie grava lingva problemo montrighis, Stephanie proponis Esperanton kiel ebla solvo; iu informis ke ekzistas inform-tablo de AVE pri Esperanto en la informo-foirejo.
2. Green Left, maldekstra grupo de la angla & kimra Verda Partio GPEW, okaze de la lasta baloto por la Europa Parlamento disdonis insignon kun la subskribo „Elekti Verdulojn“ en 8 lingvoj inter ili Esperanton !

La kongreso estis tre bone organizita en la bela kaj bone tauga centro je la Mersey-rivero. Liverpool montras multifacetan bildon kaj survojas modernighi. La kongresanoj laboris en pluraj plenaraj sesioj kaj multaj paralelaj kunsidoj, vespere estis kulturaj eventoj – kompreneble ankaŭ de la Beatles – detala raporto sekvas.

2017-03-26 EELV enmetis subtenon por Esperanto en sian programon.
Grandan gratulon al la Esperanto-Komisiono de EELV (la franca Verda Partio):
La aktuala programo-teksto de EELV estis ĵus eldonita sub la titolo „Bien Vivre“ - Vivi Bone, kaj pri lingvo-politiko ili skribis: "Nous soutiendrons une langue neutre internationale telle que l'espéranto." Ni subtenas internacian neutralan lingvon kiel Esperanto.
www.esperanto.eelv.fr/le-projet-2017-deelv-bien-vivre/

2017-03 Chu EELV en Francio subtenu Hamon au Melenchon (Parti de Gauche = socialisma) ?

Du komentoj venis el Francio, kiuj preferas Melenchon kaj dubas chu Hamon (Parti Socialiste = socialdemokratia) garantias la verdpartiajn temojn ?

Komento AVE/mw: Aliflanke – chu la kandidato de la malgranda partio vere havas shancon ?

2016-12-13 **Litovio:** Verdula kaj Kamparana Partio (LVZhS, lvls.lt) en registara koalicio kun Socialdemokratoj. Char la antaŭaj registaroj ne sukcesis progresigi la landon, LVZhS ricevis 21,5% (54 seghoj) kaj sekve Saulius Skvernenis ighis chefministro. Interese estas, ke pluraj ministroj ne apartenas al iu ajn partio. Krom la LVZhS ekzistas relative nova Verda Partio (LzhP, lzp.lt), kiu gajnis 1 seghon en la baloto.

2017-02-26 **Jadot kaj EELV subtenos Benoit Hamon de la Socialistoj**

Char la shanco por Jadot estis ne sufiche granda, li kaj EELV interparolis kun Hamon.

Ili verkis 15-punktan interkonsenton, kiu entenas plurajn ekologi-rilatajn temojn.

Inter ili grava celo fini la atomenergion ene de 25 jaroj, pesticidoj, Bure ...

Jen la decido: <http://eelv.fr/un-rassemblement-pour-faire-gagner-lecologie/>

Vi trovos la interkonsenton sur nia retejo: verduloj.org

Kaj jen la listo da komisionoj en la Verda Partio de Francio, kiu entenas Esperanto-Komisionon:

<http://eelv.fr/les-commissions-thematiques/> (la greeneuropeanjournal.eu)

2017-01-30 **Francaj Verduloj respektas Esperanton, respondo de la estro:**

Bonjour Marc,

Merci de votre sollicitation et veuillez nous excuser pour le délai de réponse. Yannick Jadot défend effectivement l'apprentissage et l'usage de l'espéranto comme langue neutre et équitable.

L'apprentissage et la connaissances de différentes langues est une priorité, pour répondre à nos besoins de communication. A ce titre le développement de l'espéranto permet de répondre à plusieurs de nos objectifs en terme de diversité linguistique, de démocratie et d'émancipation humaine.

L'usage de cette langue est reconnu pour son intérêt dans les échanges entre les peuples et son action en faveur de l'amitié transnationale.

L'apprentissage de l'espéranto est en outre relativement aisé, notamment pour les jeunes, ce qui constitue un atout majeur.

A ce titre, Yannick Jadot, dans la continuité de l'engagement d'EELV, se positionne en faveur de l'espéranto et de son apprentissage.

Je reste disponible pour en discuter au besoin

Bien cordialement,

Bastien Valtille (kunlaboranto de Yannick Jadot)

Jen la retejo de tiu teksto (chi-sube):

<http://esperanto.eelv.fr/2017-jadot-et-lesperanto/>

2017-01 **Jean Lambert estu prezidento de la Europa Parlamento**

Jen ege bona konciza parolo de MEP Jean Lambert de la frakcio Verduloj / Regionalistoj.

Kontraste al la nun elektita de la nigra-rugheta majoritato, Tajani – amiko de Berlusconi, shi prezentus travideblan demokratio favore al Homaj Rajtoj, egaleco, inklusiveco kaj ekologio.

Krome, shi parolas en modela angla lingvo: <https://www.youtube.com/watch?v=tUffPXGSj00>

2017-01-10 **Mortis Alexej Vladimirovich Yablokov (1933 – 2017-01-10)**

Li estis biologo kaj ekologo, kaj unu el la unuaj Verduloj en Rusio.

Nuntempe estas komuna frakcio de lia partio kaj de la Verduloj: <http://rus-green.ru/>

Ilia retejo montras tre detalan informon pri la vivo kaj atingoj de A.Y.

Jen la informo en la angla kaj en la rusa:

<http://europeangreens.eu/news/it-great-sadness-we-announce-loss-alexey-yablokov>

